
願生浄土の仏道

La Budha Vojo celanta al Purlando

山口真一 / Yamaguti Sin'iti

最近は、新聞でもテレビでも、人が死ぬことを「天国に行った」と表現することが多いようです。この《天国》とは何でしょうか。

キリスト教でいう《天国》とは《神の国》のことですが、仏教でいう《天》とは六道輪廻の最上段階ではあるものの、迷いの境涯を超えるものではありません。また、キリスト教の《地獄》は《天国》の反対ですが、仏教では《地獄》《餓鬼》《畜生》《阿修羅》《人》《天》は一つながりになっていて、この間をぐるぐるとさまよっている、と教えられます。

たしかに、仏教でも「生天」をもって在家信者の理想とすることがあります。しかしこれはあくまでも「仮免許」のようなもので、最終目標ではありません。

あるいは、「冥福を祈る」という言葉もよく聞かれます。冥福は《冥土》における福を願う、ということで、ある意味で死者を冒瀆するものですから、仏教徒としてはこういう表現を使うべきではないでしょう。

仏教ならば「極楽浄土に往生した」というべきでしょう。《浄土》は六道を超越した世界です。「天国も極楽浄土も同じようなもの」と思われる方もいらっしゃるかもしれませんが、まったく別のことがらです。天国は、神と

Lastatempe kaj ĵurnaloj kaj televidoj en tre multaj kazoj uzas la esprimon "iri al paradizo" por homa morto. Do, kion signifas tiu ĉi «paradizo»?

«Paradizo» estas, laŭ kristanismo, «la Dia regno»; dume «paradizo» aŭ «la ĉiela mondo», laŭ budhismo, troviĝas sur la plej alta stadio de la ses mondoj de metempsikozo aŭ samsaro, sed ĝi neniel superas la sferon de iluzio. Aliflanke, ĉe kristanismo «infero» estas la malo de «paradizo», sed ĉe budhismo la mondoj de «infero», «malsatulo», «besto», «asuro» (dio de batalo), «homo» kaj «paradizo» faras unu rondon, en kiu oni sensekve unu post la alia migradas.

Fakte en budhismo oni iakaze diras, ke naskiĝi en paradizo estas la idealo por laikaj kredantoj. Sed ĝi estas nur portempa licenco por progresi ankoraŭ plu, sed ne estas finfina celo.

Cetere mi ofte aŭdas la esprimon "deziri la feliĉon (de mortinto) en la malluma mondo." Ĉar ĝi iasence profanas mortintojn subigante ilin en mallumon, budhanoj devus eviti tiun ĉi esprimon.

Laŭ budhismo, la plej taŭga esprimo por homa morto estas "naskiĝi en purlando de feliĉo." «Purlando» superas la ses mondojn de samsaro. Eble iu el vi

の契約において、選ばれた人たちだけが生まれ変わることを許された世界ですので、キリスト教徒でない人がそこに行くことは絶対にありえません。これに対して浄土は、死後の世界である以上に、覚りの世界を意味します。ですから、そこへ往生するための条件は、仏教を信じているかどうか、仏教徒であるかどうか、というよりも、真実に目覚めた生き方ができているかどうか、あるいは少なくとも、真実に目覚めようと志しているかどうか、ということになります。成仏、仏に成るとは、何よりも先ず、覚者（サンスクリット語で *buddha*、漢字で音訳すると 仏陀、略して 仏）となることを意味するのであって、何も死んでからの話ではないのです。

私たち凡夫もまた、浄土往生を願いつつ、目覚めた生き方をしようと志すこと、願生浄土の仏道を歩むことが、仏の方から誓われています。残念ながら凡夫の性として、時に目覚めることがあってもすぐにまた眠り込んでしまうことでしょう。が、最後の最後まで、それこそ最期の瞬間まで真実に目覚めようとする者にとって、死後の《天国》は無縁の世界です。

浄土往生とは
最期まで
目覚めつづていく
生き方のことです

pensas, ke paradizo kaj purlando estas preskaŭ samaj; tamen tute ne. Paradizo estas la mondo, en kiu ĉe la kontrakto kun Dio nur elektitaj homoj rajtas naskiĝi. Ne-kristanoj neniel povas iri al paradizo. Dume purlando signifas la mondon de vervekiĝo pli ol postmortan mondon. Tial la kondiĉo por naskiĝi en ĝi estas, ĉu ni vivas kun la konscio pri la vero aŭ ne, aŭ almenaŭ ĉu ni volas vivi tiel aŭ ne, sed ne ĉu ni estas budhano aŭ ne. Budhiĝi estas, antaŭ ĉio, fariĝi vervekiĝinto (sanskrite *buddha*); tio ne temas pri postmorta afero.

Budho ĵuras, ke ni banalaj viv-estaĵoj dezirante la naskiĝon en purlando aspiru al la vivmaniero konscianta pri la vero kaj paŝu la budhan vojon celantan al purlando. Ni pro la naturo de banalaj viv-estaĵoj tuj emas endormiĝi eĉ post eventuala vervekiĝo, bedaŭrinde. Se ni tamen intencas daŭran konsciadon pri la vero ĉiam ĝis la lasta momento de la vivo, nome ĝis la morto, postmorta paradizo jam tute ne rilatas al ni.

Naskiĝi en purlando
signifas la vivmanieron
dezirantan konsciadon
pri la vero
ĝis la lasta momento.